CNT AIT FAI

INTERNACIA LABORIST-ASOCIO

# INFORMA BULTENO

NACIA KONFEDERACIO DE L'LABORO

IBERIA ANARKISTA FEDERACIO

ADRESO: ESPERANTO-FAKO AV. DURRUTI 32-34
BARCELONO — HISPANIO

II-a jaro | 10 Oktobro 1937 | Numero 7

# C. N. T. K F. A. I. KONKERAS ARAGONON

Antaŭ nelonge la gazetaro respublikana k komunista parolis malŝate pri la fronto de Aragon. Diris, ke estas fronto mallaborema, ke estas fronto senmova, ke estas fronto, kiu ne estas konkerinta ion; sed ĝi ne aludis pri la kialoj de tiu situacio. La vera kaŭzo pri la senmovo de la fronto de Aragon estis, ke ĝi ne estis provizata per la bezonaj militmunicioj, pro tio ke preskaŭ la tuta fronto estis defendata de soldatoj de C. N. T. k F. A. I.

Fine la generala stabo decidis entrepreni operaciojn ĉe la fronto de Aragón k donis militmaterialon k ĉion, kio estas necesa por fari sukcese atakon; sed eĉ en tiuj cirkonstancoj ĝi ne povis eviti la politikon. Sendante militmaterialon, ĝi sendis ankaŭ la komunistajn ĉefojn Lister, Kleber, Walter k. a. K plej malbona en tiu kazo estas, ke la komando ĉe Aragon estis komisiita al tiuj ĉefoj, kiuj ne konas la terenon k la fortojn, kiuj operacias en tiuj sektoroj. Per tio la militpolitikistoj volis akiri du aferojn: senprestiĝigi la estrojn de la divizioj, kiuj luktis dum pli ol unu jaro en Aragon, kiuj ne retroiris eĉ paŝon dum sia agado k kiuj pasigis ĉe la fronto semajnojn k semajnojn, forpuŝante la malamikon per dekduo da fusilkartuĉoj, kiuj konis tre bone la terenon k pro tio devas estri la bataloperaciojn. Aliparte oni volis evidentigi la kapablon de la ĉefoj, kiuj havis nenion vidi en Aragon, sed kiuj apartenas al certa partio k tial ke tion postulas tiu partio. Tiel estis eksigita ĉefo de la generala stabo, batalanto de C. N. T. kamarado Yoldi k la komando komisiita al iuj, kiuj unuafoje surpaŝis la teron de Aragon. Al la kamaradoj Ortiz k Jover oni malpermesis direkti la bataloperaciojn, dum la samaj estis komisiitaj al Walter k Kleber. Malgraŭ ĉi-ĉio, estis la anaroj de C. N. T. k F. A. I. la unuaj, kiuj eniris en Quinto, Pina, Belĉite, Mediana, Zuera k Albarton, kiel ankaŭ en la ceteraj vilaĝoj.

Ĉiuj ŝtormbrigadoj, kiujn estris la kamaradoj de C. N. T. k F. A. I., plenumis la ordonojn donitajn de la stabo neretroirante eĉ momenton dum oni ne povas diri la samon pri la aliaj brigadoj.

La bataloperacioj ĉe Aragon estis faritaj per tiom da partieco, ke la militisto Sanchez Plaza, kiu estris la plej akran el la bataloperacioj ĉirkaŭ Belĉite, estis anstataŭita per la komunista ĉefo Walter, kiam konstatiĝis sen ia ajn dubo, ke Belĉite jam estas konkerita. Kiam Belĉite jam estis sieĝita komplete, kiam oni estis luktantaj sur ĝiaj stratoj, kiam restis sufoki nur tri faŝistnestojn, la trupoj apartenantaj al C. N. T. ricevis ordonon forlasi Belĉiten k direkti sin senprokraste al alia frontsektoro, dum okupis Belĉiten ŝtormgvardioj estritaj de komunista ĉefo.

Tiel la generala stabo k ĉiuj povus atribui la honoron pri la konkero de Belĉite al militisto, kiu ne estis en Aragon k kiu ne partoprenis la plej akrajn batalojn de Belĉite, sed kiu anstataŭ tio estas komunisto.

Tio ne okazis nur en Belĉite, sed en ĉiuj vilaĝoj, kiuj estis konkeritaj, kie ni povis konstati analogajn faktojn. Por ke oni ne diru, ke ni parolas trompe, ni citu konkretajn datojn pri la aktivo de C. N. T.-batalfortoj en Aragon.

La 1a, 2a, 3a k 4a batalionoj de la 120 Miksa Brigado de la Divizio Durruti prenis la pozicion de Pina, antaŭeniris super Kinto k kunlaboris en la konkero. La samaj batalionoj prenis la pozicion de Bonastre, kie trovis multan militmaterialon k inter ĝi du kanonoj de 7'5. Kiam estis konkerita Bonastre, ili daŭrigis antaŭen ĝis la Fuentes de Ebro. Tie estis anstataŭitaj.

Tri batalionoj de 119 Brigado Miksa, ankaŭ apartenanta al la divizio Durruti, konkeris la gravan pozicion de Pedrusos; la komunistaj gazetistoj, kiuj estis invititaj ĉeesti la bataloperaciojn, atribuis la konkeron de Pedrusos al la komunistaj fortoj, dum estis la "tribanoj" de Durruti, kiuj ĝin konkeris.

La Brigado 116 de la Divizio Ortiz kune kun la Brigado 32 konkeris Kodo'n, kiu estas pozicio tre grava post Kinto k Belĉite. Por ke vi povu prijuĝi la partoprenon de tiu Brigado en la bataloperacioj, ni citu, ke ĝi havis kiel perdojn 3 kapitanojn k 2 komandantojn, kiuj iris ĉekape de la fortoj. Krom la konkero de Kodo, la Brigado 116 partoprenis tre efike es la konkero de Belĉite.

La Brigado 117 de la Divizio Ortiz, disponigita al Perez Salas, konkeris la pozicion de Novia del Viento, la ponton de Pueblea de Alborton, la vilaĝon, la stacidomon de Azuara, Casa de Romanicos, Carboneda, Ueyo, Sierra de la Serna k la stacidomon k la fortikaĵon de Belĉite.

Al la konkero de Belĉite kontribuis ankaŭ la C. N. T.-Brigadoj 153 k 16.

La Brigadoj 125, 126 k 127, apartenantaj al la divizio 28 (Francisco Ascaso) k estrataj de nia kamarado Jover, faris ĉiujn bataloperaciojn, kiuj estis ordonitaj de la stabo. La samaj Brigadoj estis disponigitaj al la ordonoj de la komunistoj k havis sufiĉajn perdojn.

Ĉiuj niaj kamaradoj sintenis tre bone k akiris multnombrajn laŭdojn de la respondeculoj dum la komunista estro Trueba, komandanto de 27 divizio (Karlo Marks) estis eksigita. La samo okazis al Kleber, ĉefo de la divizio 45,

# K-dino Emma Goldman denove en Hispanio

Rece nin vizitis la veterana batalantino, la anarkistino Ema Goldman, kiu plenumas permanentan mision de C.N.T. en Anglio, kie ŝia laboro estis evidente fruktodona, ĉar ŝi sukcesis konatigi nian aferon en la medioj, kiu ĝis nun al ni estis strangaj. Ŝi venis por trairi ankoraŭ foje lojalan Hispanion cele akiri rektajn impresojn pri la laboro, kiu ĉi tie disvolviĝas por konatigi ilin precize eksterlande. Dum ŝia restado en Valencio ŝi estis intervjuita de la k-doj de "Fragua Social", al kiuj ŝi faris la sekvantajn deklarojn.

—Kiel vi vidas la internacian situacion rilate al la problemo pri Hispanio?

—La reakciaj k faŝistaj potencoj, kiel vi scias, estas malkaŝe kontraŭ la hispana popolo. Ankaŭ la demokrataj potencoj ne volas la venkon k la hispanan revolucion. La internacia kapitalismo havas neniun intereson ke stariĝu en Hispanio nova reĝimo sur la bazo de la libera socialismo. La tutmonda proletaro estas la unika, kiu simpatias la lukton de la hispanaj laboristoj, sed ankaŭ estas vero, ke ĝi ne estas bone informita pri la vera situacio en Hispanio. Oni ne scias kion signifas la kolektivigoj en la kampo k la industrio. Ankaŭ oni ne scias, ke la funkciado de la kapitalismo malaperis en granda parto de Hispanio. Sed la situacio ekonomia k politika de la plimulto el la landoj ekstere de Hispanio estas tia, ke estas tre malfacile estigi malkaŝan intervenon favore al ni. Alia faktoro, kiu krozas sur la vojo de la solidaro estas la timo pro tutmonda milito. Pensas multaj, speciale la demokrataj landoj, ke la malfermo de la armmerkato al Hispanio signias la komenciĝon de tutmonda fajrego.

—Kion vi opinias pri la decidoj de la Socialistaj Internacioj?

—Mi pensas, ke ekzemple en Anglio, Usono estas konservativa faktoro, unu el la firmaj bastionoj, sur kiu baziĝas sian ekziston la Brita Imperio. Pro tio necesas, ke la ekpuŝo naskiĝu en la bazo, t. e. en la mema proletaro k se estus necese, kontraŭ la volo de iuj elementoj reformemaj. Ni povas fidi, ke miloj da laboristoj de la Trade-Unioj k ankaŭ de la Sendependa Laborista Partio ekmoviĝos por partopreni energie k tutforte konkrete en la proksima futuro.

—Ĉu la laborista movado povas havi forton sugesti super la registaroj devigante ilin rekoni niajn rajtojn?

—Tiu forto enestas nature en la proletaro mem. Ĝia disvolviĝo dependas de du faktoroj: Ie, de la ekonomia situacio, k poste de la konscienco. Grandaj luktoj ekonomiaj en aliaj landoj povas kontribui al kreado de situacio pli aŭ malpli revolucia. K en tiu situacio estas multe pli facile komprenigi al la proletaro la internacian signifon eksterordinaran, kiun havas la antifaŝisma milito en Hispanio.

—Kion vi opinias pri la ekonomiaj realigoj de la hispana proletaro?

—La ekonomiaj realigoj de la hispana proletaro havas gravegan signifon. Estas admirinde, kiel la hispanaj laboristoj, luktante bonparte por la liberecanaj ideoj, povis realigi tiom da aferoj sur la socia tereno dum mallonga militperiodo. La karakteriza signo de la nova hispana situacio konsistas en tio, ke la proletaro ekpovis iniciati rekontruadan laboron dum akra milito, kiel tiu, kiun subtenas kontraŭ la faŝismo. Bazante min sur la observoj, kiujn mi akiris pasintjare pri la katalunaj industrioj k en la kampoj de Aragon k Valencio, k komparante ĉion kun tio, kion mi vidis ĉijare, mi povas certigi, ke ekzistas granda progreso en la ekonomia ordo k mi povas ekstremigi mian admiron pri la kapablo de la hispana proletaro k de nia organizo C. N. T. La eksperimento de la hispana proletaro servos kiel ekzemplo ne nur por la novaj generacioj de Iberio, sed ankaŭ por la tutmonda proletaro. La laboristoj el ĉiuj landoj devas danki al siaj hispanaj fratoj pro ilia krea povo, anonco pri nova vivo.

—Kion vi opinias pri la alianco inter U.G.T. k C.N.T.?

—Mi pensas, ke alianco tiaklasa, se ĝi estas kreita tutlojale ambaŭflanke, povas esti la pleja garantio por la milittriumfo. La signifo de tiu unueciĝo transpasos la landlimojn de Hispanio. Ĉe la internacia proletaro ne estas unueco, sed malkonkordo, k la revolucieca alianciĝo de la hispana proletaro estas bona harmonio inter la laboristoj el la tutmondo. La internacia kapitalismo scias tre bone, ke la unueciĝo de la ekonomia forto de la proletaro estas la plej granda danĝero, krozanta antaŭ ĝian ekziston. Pro tio ĝi aspiras malakceli tiun unuiĝon.

—Kion vi opinias pri la Antifaŝista Fronto, kiun proponas C. N. T. por doni unuecon al la batalo de nia popolo?

—Mi konsentas komplete pri la Antifaŝista Fronto, proponita de C. N. T. al ĉiuj organizaĵoj k partioj. Mi opinias, ke tiu Fronto devas obteni kiel senprokrastan konsekvencon la forigon de ĉia partieca agado, de la mizeraj intrigoj k de la politikaj ambicioj de ties konsistigantoj, k ke tiu Alianco devas centrigi sin al la granda celo premi la faŝismon. Mi esperas, ke la Antifaŝista Alianco proponita de C. N. T. realiĝos, precipante la finvenkon.

---

kvankam ke li 24 horojn poste k certe pro influo de la politikistoj estis repostenigita.

Tiu estas, libere eksponita, la aktivo, kiun en la frontoj de Aragon elmontris la fortoj de C. N. T. Tiu estas la nerefutebla pruvo, ke se oni estus donintaj armilojn al la fortoj de Aragon, eble la milito ne estus en la situacio, en kiu aktuale ĝi troviĝas, k eble ili estus havontaj tempon por finigi la militon k la faŝismon.

---

## ALVOKO PRI LA SAVO DE LA HISPANAJ INFANOJ

La Sindikato pri la Instruado en Barcelono disvastigas la jenan alvokon.

Estimata kamarado, la Sindikato pri la Instruado en Barcelono direktas alvokon al la universala solidaro favore al la hispanaj infanoj, senkulpaj viktimoj de la kruela milito, kiu dezertigas la hispanan landon.

La Sindikato pri la Instruado prenis sur sin la taskon savi la plejparton el la infanoj hispanaj al la malproksimaj regionoj de la batalkampoj, starigonte lernejajn koloniojn, en kiujn la infanoj estos loĝigataj kolektive, aŭ laŭeble estu gastigataj en unuopaj familioj.

Ĉu vi povus helpi al ni en nia tasko? Alsendu al ni adresojn de organizoj k personoj bonvolaj, kiujn vi kredas utilaj al ni, kielsame de hispanoj k hispanaj organizoj, kiuj kunlaborus kun ni por nia tiel humana celo.

La Sindikato pri la Instruado
Av. Pi k Margall, 35.
Barcelono.

# PROMENEJO

"Popola Fronto" (n-ro 22), nia jam konata amiko, en la artikolo "Ni servu la veron!" pretendas per vortoj ne per pruvoj dementi la informajojn de "Sennacieca Revuo", ke "en Katalunio la kolektivigoj iom post iom estas nuligataj, k la burĝaj leĝoj estas validigitaj; centoj da anarkistoj estas atestitaj".

Jen la demento: "Ni serioze asertas k reasertas, ke la leĝaj kolektivigoj ne estas nuligitaj en Katalunio nek en la cetero de la hispana lando; nur oni nuligas la kapricajn kolektivigojn, kiuj estis plej ofte truditaj je la servo de novburĝaj grupoj, kiuj ne akordiĝas kun la koncerna revolucia leĝo".

Tio estas aserto, eble serioza, sed senpruva k senargumenta. Fakte tamen la dekreto de II^a de Aŭgusto pri la forigo de la Konsilantaro de Aragon tuŝas ankaŭ la kolektivigojn k multaj el la lastaj jam estas nuligitaj. K tiu negativa sinteno al la kolektivigoj ne estas hazarda nek kaprica. Ĝi estas direble fiksa pozicio (opozicia). La hispanaj komunistoj kontraŭas ajnan kolektivigon. Laŭ ilia diro nun ne estas oportuna tempo por kolektivigo. Tion cetere konfirmis la esperanta bulteno de P. S. U. C. "Informoj pri Hispanio" (n-ro de junio) per la artikolo "La katalunaj kamparanoj ne volas la kolektivigon". Jen: "La kataluna industrio nun ne estas en kondiĉoj havigi al la agrikulturo la modernajn maŝinojn bezonatajn, ĉar ĝi devas plenlabori por la milito. Ĝi ne povas doni al la agrikulturo traktorojn, ĉar ĝi devas fabriki armilojn. *Ĉiu kolektivigo en tiuj ĉi kondiĉoj povas kaŭzi almenaŭ en la unuaj momentoj malpligrandigon de la produktkvanto*".

La afero estas tute klara, k "P. Fr.", ne tordu ĝin per elegantaj frazoj. Ne ĉiu elegantaĵo ja estas noblaĵo.

Plie "P. Fr." devas konkretigi, kiuj estas la "kapricaj kolektivigoj", kiujn "nur oni nuligas". Kiuj "kapricaj kolektivigoj" estas "plej ofte truditaj perforte". K poste—kiuj estas tiuj "novburĝaj grupoj, kiuj ne akordiĝas kun la koncerna revolucia leĝo". Pri ĉi ĉio "P. Fr." devas prezenti konkretajn pruvojn, se ĝi volas "servi la veron".

Rilate la revalidigon de la "burĝaj leĝoj". P. Fr. diras: "Nur estas revalidigitaj la burĝaj leĝoj, ĉefe respublikanaj, kiuj ne kontraŭas la novajn k kiujn oni kredis utiligeblaj, ĉar estas vere demokrataj k taŭgaj por la nova situacio".

Laboristoj, vi kredas la burĝajn leĝojn "utiligeblaj, ĉar estas vere demokrataj k taŭgaj por la nova situacio"—ĉu ne? Do pro kio vi klopodas forrenversi la burĝan reĝimon, kiu sin apogas sur tiuj "utiligeblaj burĝaj leĝoj"? Nur burĝo ja defendas burĝaĵon.

Certe la revalidigo de la leĝo, fare de la registaro de Negrin, pri la restarigo de la religia kulto privata estas utiligebla, "ĉar ĝi estas vere demokrata k taŭga por la nova situacio". K poste—Marks ne diris, ke la religio estas opio por la popolanaro.

Pri la informaĵo de "Sennacieca Revuo", ke centoj da anarkistoj estas arestitaj, P. Fr. tombe silentas. Eble la "Ni servu la veron" ne tuŝas ĝin.

En la arikolo "En la regno de la fantazio" la informaĵaron, kiun donis Informa Bulteno, k kiu poste estis represita de Sennacieca Revuo, oni taksas kiel "unikan romanon", komparebla kun "La Insulo de la Trezoro" de Stevenson.

Ĉar:

"Ni ja komprenas, ke la romanisto statis en la monato Junio sub tre freŝa k ne tre agrabla impreso. Aliflanke ni scias, ke la verko oni destinis al eksterlando, sekve ĝi estas speciale verkita por eksporto. La propaganda celo do klarigas ĉion".

Jen la konkretaj, la nediskuteblaj faktoj, kiuj elokvente pruvas, ke la informaĵaro de Inf. Bul. pri la Majaj okazintaĵoj estas "regno de la fantazio", "unika romano", "sensaciaj fabeloj", "ekstreme partiecega romano" ktp! K "neniu kredu, ke mankas al ni argumentoj por kontraŭdiri la sensaciajn fabelojn"!

Ŝajnas, la artikolo de Inf. Bul. "La situacio en Katalunio" aparte prancigis la redaktorojn de P. Fr. kiuj konkretigas jene: "Pri la respektindaj organizoj, kiuj respondecas pri Informa Bulteno, ni volas nur sciigi, ke iliaj membroj sidas en ĉiuj urbaj k provincaj komunumoj de la popola Hispanio".

Jes, "iliaj membroj sidas en ĉiuj urbaj k provincaj komunumoj de la popola Hispanio" tamen ne en siaj loĝejoj, sed en la karceroj. Ni invitas la redaktorojn de Popola Fronto veni al Barcelono k viziti la Modelan Karceron, en kiu troviĝas inter la 800 antifaŝistoj ĉirkaŭ 600 anarkistoj k ilin demandi, ĉu "la membroj de la organizoj, kiuj respondecas pri Informa Bul. sidas en ĉiuj urbaj k provincaj komunumoj de la popola Hispanio". Se tio ne sufiĉas, ili povas entrepreni pilgrimojn "en ĉiuj urbaj k provincaj komunumoj de la popola Hispanio", en kies karceroj troviĝas ankoraŭ kelkaj centoj da anarkistoj.

Do ni ne "trompe aŭ propagande emfazas, ke la registaro persekutas proletojn k aplikas terurajn metodojn kontraŭ difinita doktrino".

En la fina parto de "Kolega Flikaĵo" estas donita respondo de nia Promenejo el n-ro 4 jene: "En alia fragmento per kapricaj saltetoj tra frazoj de tikla artikolo nia oni pretendas pruvi, ke ni akuzis la P. O. U. M.-anojn kiel spionojn de la faŝismo. Ni ne faris tion!"

Ĉe vere vi ne faris tion? Eble vi suferas atavisman amnezion. Do ni rememorigu al vi viajn proprajn vortojn. Jen: "Temas ĉi tie pri ogranizo (t. e. P. O. U. M., red) kiu sub la ŝaŭmo de tre demagogiaj devizoj kondutis ĉiam agitece eĉ kontraŭ la antifaŝistaj reguloj de la nova situacio"... "Tiu konduto de la gvidantoj de P. O. U. M. jam de longe meritis dubojn pri la sincereco de ilia revoluciemo. Frukto de ĉi ĉio estis la hontindaj okazintaĵoj de Majo! La ekzisto de provokistoj en nia ariergardo; elementoj, kies agitado favoras la planojn de la Faŝismo, ja ne estas fantazio nek triviala blufo, sed bedaŭrinda k fakta realo". "Spionado serve al la faŝistoj', konekto kun la malamikoj, politika misorientigo por la naivaj senkonsciaj kredemuloj, facile knedeblaj k kondukeblaj al katastrofa aventuro, ŝajne tre revolucia, sed fakte plene kontraŭrevolucia, estas atentindaj faktoroj ekzistantaj en nia tendo. Vidi ilin, detrui ilin, estas elementa kondiĉo". (P. Fr. n-ro 18).

"Ni servu la veron", karaj redaktoroj de Popola Fronto.

Nu ni finu nian Promenejon per la konkludaj vortoj de la artikolo de P. Fr. "Ni servu la veron":

"Tio estas la vero, la simpla k tuta vero, k nur restas al ni bedaŭri sincere, ke laborista gazeto... false informadas la legantojn".

---

*Oni ne povas paroli pri ajna demokratio en lando, en kiu la malsampensantoj estas persekutataj k enkarcerigataj. Vera demokratieca reĝimo esceptas ian ajn tiranion aŭ teroron!*

# INTER LA KAMPARANOJ DE ARAGONO


## Alkanjiz

Bela urbeto kun 8000 loĝantaro, proksime de la provinca ĉefa urbo Kaspe. Batalo ne okazis. La faŝistoj estis ne multenombraj. Tuj post la 19 de Julio 1936 la laboristoj decidis la eksproprigon de la faŝista propreco k la kolektivigon de la tero. C. N. T. k F. A. I. estis plimultaj. Ne estis renkontita rezistado kontraŭ la kolektivigo. U. G. T., komence iom reprezentata, plifortiĝis dum la venintaj monatoj. C. N. T. ne akceptis en siajn vicojn tiun, kiu ne akceptas la kolektivigon. Kiuj ne estis konsentaj rilate al ĝi, aliĝis al U. G. T. La numero de la aliĝintoj al U. G. T. kreskis ĝis 1600. Tiu de la aliĝintoj al C. N. T. ĝis 1700, plus 4 grupoj de F. A. I. k ĉirkaŭ 300 membroj de JJ. LL. "Kulturo k Agado" estas la urba ĵurnalo. Ĝi aperas du fojn semajne. Ĝia direktoro, membro de JJ. LL. estas Manuel Salas.

La komerco ne estas kolektivigita. Estas etkomercistoj, kiuj plu havas vendejon. La kolektivigado komprenas la transportaron. La domoj estas propreco de la Komunumo. Oni ne pagas pri elektro nek akvo. La urbanaro havas du kinejojn; ili estas kolektivigitaj de U. G. T. k C. N. T. Sed la plimultoj el la laboristoj, 32, apartenas al C. N. T. k 5 al U. G. T.

La pastroj forkuris; la preĝdomo ne estis forbruligita. Hodiaŭ ĝi estas okupata de la kolektiva magazeno. Inter ĝiaj kolonoj troviĝas la pluraj sekcioj; la alpargatoj * ĉi tie, sapo k aliaj aĵoj por purigo—kontraŭe; nutraĵoj, konservaĵoj, viando k kolbasoj—tie; toloj k teksaĵoj en la fundo. Kie antaŭe troviĝis la granda altaro, estas la terpomoj. En niĉego de flanka altaro—sakoj da sukero k faruno. La sakristion oni transformis en fabrikon por pastoj. Estas ankaŭ ĉambroj. Nenio estas aĉetebla per mono, sed per valorpaperoj. Ĉiu kolektivisto havas karton k kajeron da valorpaperoj. Li enskribas sin en la oficejo k kion volas akiri, ĝin ricevas en la vendejo. La ĉefpordo estas por la homoj. Tra la flankpordoj eniras la ŝarĝveturiloj. Vasta vendejo.

*) alpargato — kanaba piedvesto




Parto el la pregejo, kiu nun servas por kolektiva magazeno



K-do A. Souchy prenas notojn

La tagsalajro ne estas abolita komplete. En la Urbestrara Konsilantaro C. N. T. havas 6 postenojn k tiom U. G. T. La prezido estas al C. N. T. Oni laboras 9 horojn ĉiutage dum daŭras la milito kontraŭ la faŝismo. La tagpago estas 10 pesetoj. Kilogramo da pano kostas 060 p. viando—4'50, terpomoj—0'65, oleo—2'10, vino—0'90, sukero—1'80.

La kolektivigita mastrumejo posedas 8 premmaŝinojn por akirado de oleo el olivoj, 3 muelilojn k 1 elektrejon movatan per hidraŭlikaj fortoj. De kiam ekzistas la kolektivigita mastrumejo, ĉiuj infanoj povas iri al lernejo. La instruistoj apartenas al U. G. T.

500 kamplaboristoj formas kolektivigitan mastrumejon, grandan familion. La tagpagoj ne ekzistas; la aliĝintoj laboras en la bienoj, kiuj antaŭe apartenis al la faŝistoj. Unu el ili produktas 36000 litrojn da olivoleo jare, ekster de vino, tritiko k aveno. La bieno posedas 6 ĉevalojn, sed neniun bovinon. La kolektivigita bieno estas "Cerrado de Marques". Ĉi tie ankaŭ ne estas bovinoj. En la plimulto el la vilaĝoj nesuficas la lakto. Ĝi ne estas donata al la infanoj; nur al la malsanuloj. La plimulto el la sociatanoj loĝas en la urbo, kvankam laboras surkampe. Ĉiudimanĉe 'ili'

# INTERVJUO KUN K-DO JUSTO ESTAN

Justo Estan. Pri li mi estis leginta en kelkaj esp. revuoj. De li artikolojn mi estis leginta ankaŭ. Tamen persone mi konatiĝis kun li en Barcelono. Ĉi tie la revolucio renkontigis nin. Li multjara migrinto tra pluraj landoj, mi junulo, jus forlasinta sian landon.

Antaŭ 4 monatoj li forveturis al Valencio k nun reveturas. Sed leŭtenanto. Tamen la antaŭa kamaradeco, nearoga konduto al la kamaradoj, amuza babilemo, plaĉa kantemo estas konservitaj.

Mi utiligas la okazon fari kun li intervjuon. Li, kantante, kapjesas ridete.

—K-do Justo, ni, la liberecanoj, estas laŭprincipaj antimilitistoj. Ni malŝatas la militistaran kaston. Ni kontraŭas la militon. Kiel do vi fariĝis militisto?

Li momente ekpensas. Poste afable ridetas:

—Pario, vere tre delikata demando. Antaŭ ĉio, tamen, ne forgesu, mi ne fariĝis militisto por aliĝi al la militistara kasto, kiu kondukas la popolanaron al buĉado. Aŭ pli guste, kiu mem aranĝas tiun hombuĉadon. Sed mi deziras per la akiritaj konoj teknikaj k strategiaj helpi al ĝi fari sukcese la revolucion, triumfigi ĝin k forbalai la faŝismon, kiu furiozas k aspiras uzurpi la popolanaran liberon. Post la venko super la faŝismo k la triumfo de la revolucio mi pretas depreni mian militistan uniformon k reiri al la fabriko. Sed, k-do, estas tre strange, ke la alilandaj liberecanoj k pacamantoj ne volas kompreni kiel la hispanaj anarkistoj tiel fervore k kuraĝe per ĉiuspecaj bataliloj luktas ĉe la fronto kontraŭ aliaj homoj. Ilin strangas nia agado. Sed ĉu ili, kiuj miriĝas pro tio, ke la hispanaj anarkistoj fariĝas kapitanoj, komandantoj, ministroj, urbestroj ktp., ne agus sammaniere? Ho jes! Ni metu ĉiujn ilin, kune kun iliaj geavoj, gepatroj k gefiloj en urbo, poste aliuj venu al la sama urbo k faligu per aeroplanoj bombojn por dezertigi k senhomigi la urbon. Kiam ili vidos la korpetojn de siaj infanoj dispecigitaj, kiam ili vidos la maljunulojn, kies korpoj jam pezas kvazaŭ plumbo, k nepovante rifuĝi estas surstrate pereigataj, kiam sub la ruinaĵoj patrinoj k patroj ekserĉos la korppartojn de siaj idoj, ho tiam ne restos dubo, ke ili ne tre hezitus iel ajn defendi sin k siajn proksimulojn. Tio aktuale okazas en Hispanio.

—Sed vi formarŝos al la fronto por defendi la patrion?

—Ho tute ne! Se en Hispanio estus eksplodinta milito pro malamikecaj interrilatoj kun alia ŝtato aŭ registaro, por protekti la interesojn de la kapitalistoj enlandaj, tiam mi estus restinta tie fore, kie mi troviĝis 19an de Julio 1936, en la altkultura k paca Svedlando. Mi formarŝas al la fronto, konsciante, ke mi batalas por la liberigo de la sklavoj k ties pli feliĉa k ĝoja estonto. La laboristoj ne devas plu esti prematoj k ekspluatatoj. Jam estas sonanta la klariono por la liberigo de la tutmonda proletaro.

—Ĉu vi supozas venkon de la faŝismo en Hispanio?

—Logike pensante, neniu konscia klasbatalanto povas supozi pri venko de la faŝismo en Hispanio. Ni la hispanaj anarkistoj atendas multon de la internacia laboristaro. De ĝi pleje estas kondiĉata nia venko super la faŝismo. Ĉar en Hispanio ni kontraŭbatalas ne nur la hispanan, sed internacian faŝismon. Mi estas tiel optimista rilate al nia venko! Mi pretas kontraŭbatali la faŝismon ĝis restos en Hispanio eĉ ĉnu sola kuglo, unu sola kunbatalanto.

Li haltis por momento. Lia mieno iĝis revema. Poste kun la sama afableco li ree ekparolis. Tiel senĝene k flue li parolas Esperanton, ke mi abrupte ekdemandis:

—De kiam vi estas esperantisto, k-do Justo?

—Mi eklernis nian karan Esperanton dum la vintro 1932-33.

—K de kiam vi estas S. A. T.-ano?

—La saman jaron mi fariĝis aktiva membro de S. A. T. k daŭre apartenas al ĝi.

—K-do Justo, ankoraŭ unu demando, kiu, mi kredas, interesas viajn multnombrajn konatojn diverslandajn.

—Diru.

—Ĉu vi intencas iam denove vojaĝi bicikle tra Eŭropo aŭ alia kontinento?

—K-do, ne estas facila tia entrepreno. Kiam en 1935 k 36 mi vojaĝis bicikle tra Eŭropo, estis preskaŭ deviga pilgrimado. El Hispanio mi migris por ne soldatservi. En Francio la polico forprenis al mi la rajton labori en la lando. Nur tiam mi planis la teruregan biciklovojaĝon al U. R. S. S. Sed nun mia deziro estas resti ĉi-tie ĝis la fina triumfo super la faŝismo.

PARIO.

# MALTRANKVILO

MARIA LUISA VERA *

—Instruistino,—
diris hindo kun vizaĝ' pensema,
blukolora pro la ventoj,
sulkohava pro l' sunard'—
diru, kial estas ni malriĉaj
k ne la bienposedantar'?

Ci ne diru, ke dank' al laboro sia,
ĉar laboras mi ĝis lasta fortofal'.
Mia patro mortis pro laciĝo
k idaro mia jen laciĝas jam
dum al la patrono senokupa
pliiĝadas kapital'.

Ci ne diru, ankaŭ, ke dank' al klereco,
estas mi taglaboristo sen kler', sci'...
Ci ja estas klera, instruistino, tamen
estas malriĉega kiel mi.

Al la pastro mi ne kredas,
kiam li predikas pri rezignaci',
pri feliĉo en la ĉielo fora
k obeo al patrono sen skrupul'.

Diru, kial estas ni malriĉaj?
Kial, se semadas grenon,
malsatmortas la taglaborul'?

Tr.: P.

* *Maria Luisa Vera estas meksikanino. Ŝi estas instruistino .Sed Vera estas ankaŭ poetino. Poetino sincera, vigla, aŭdaca. Poetino de versaĵoj por laboristoj, por kamparanoj, kiel ŝi diras. Vizitante Hispanion kune kun aliaj samlandanaj verkistoj k artistoj, ŝi donis al la redaktoro de "Solidaridad Obrera" versaĵon, ankoraŭ ne presitan.—"Maltrankvilo". Ĝi aperis en la sama gazeto 8an de Oktobro Ĝi estas plena de sentoj, sopiroj de maltrankvilo...*

*Jen ĝin ĉi-tie en traduko.*

# KRONIKO

La gazeto "Depeche" (de 29 septembro) informas: "En la komenco de Oktombro en la nomo de C. N. T. k U. G. T. Largo Kabaljero direktos alvokon al la sindikatoj el la tutmondo por devigi la registarojn al apogo. Se tio ne realiĝos, li faros alvokon por tutmonda striko. Estas ja havenda la aliĝo de la internaciaj Sindikatoj pri la Transporto k Petrolo por movado analoga al kiu okazis tra la tutmondo favore al Sacco k Vanzetti".

* * *

La cenzuro rilate al la anarkista gazetaro en Katalunio nekredeble severiĝas. La anarkistaj gazetoj ofte aperas kun artikoloj cenzure forigitaj komplete. La jurnalo "Ruta", organo de la Kataluna Liberecana Junularo, k la revuo "Don Kihot", aperigata de grupo da liberecanaj junuloj, estas malpermesitaj. La revuo "Tiempos Nuevos" ankaŭ estas malaperigita. Krom tio en la poŝtejo multaj el la bultenoj de C. N. T. k F. A. I. estas konfiskataj. "Tierra y Libertad", la organo de F. A. I. en Katalunio, estis dum certa periodo konfiskata el la kioskoj. Poste sekvis portempa malpermeso. La 25an de Septembro ĝi reaperis.

* * *

La itala profesoro Besenti troviĝas en la karcero de Civitavecchia. Lia sano de tago al tago malboniĝas serioze pro la malsaniga karcerreĝimo. Profesoro Besenti estis kondamnita pasintjare de la speciala tribunalo al 24 jara enkarcerigo pro tio ke ĉeestis la Porpacan Kongreson en Bruselo.

* * *

La 20an de Septembro la polico sen ajna motivo atake sieĝis en Barcelono la sindikatejon pri la nutraĵoj "Eskulapios", kiu samtempe servis por lernejo. La polico atakis ĝin per pluraj tankoj, kanonoj, maŝinpafiloj kun kelkcentoj da ŝtormgvardioj. La troviĝantaj en la konstruaĵo 15-20 laboristoj estis arestitaj.

* * *

En Berlino Musolini dum diskurso diris: "La fakto, ke mi venis hodiaŭ al Germanio, ne signifas, ke morgaŭ mi iros aliloken. Malantaŭ tiu vojaĝo ne estas sekretoj. Ni la nacisocialistoj k la faŝistoj volas la pacon k ĉiam ni estas pretaj labori por paco vere fruktodona. La tuta mondo demandas sin, kia estos la rezulto el la intervidiĝo en Berlino? Milito aŭ paco? Der Führer k mi respondas unisone: paco." Se dio ekzistus, eĉ li ne kresus tiajn idiotaĵojn k hipokritaĵojn!

* * *

Estas arestita en Barcelono la antifaŝisto Brand. Li estas kunredaktoro de la jurnalo "Cultura Proletaria", kiu aperas en Nov-Jorko.

* * *

La 20 k 21an de Septembro okazis en Parizo internacia konferenco de la maristaj organizoj aliĝintaj al la Internacia Federacio de la Transportlaboristoj. Estis reprezentitaj la organizaĵoj el Belgio, Holando, Danlando, Svedio, Finlando, Anglio, Francio k Hispanio.

* * *

Inter la problemoj koncernaj al la mondaj konfliktoj estis prenitaj la sekvantaj decidoj:

La Internacia konferenco de la Maristoj, kunvenintaj, en Parizo 20 k 21 de Septembro, ekzameninte la apartan situacion, en kiu troviĝas la maristoj sekve de la okazantaĵoj k omaĝinte la fortojn, kiuj konforme al la antaŭaj decidoj de I. T. F., helpis al la maristoj el pluraj landoj por malplifaciligi k malakceli la transporton destinita al la hispanaj faŝistaj havenoj. Ĝi konfirmas tiujn decidojn k insistas antaŭ ĉiuj organizoj maristaj daŭrigi la batalon kontraŭ la ofensivantoj en Europo k Ekstrema Oriento.

* * *

Estas liberigita en Valencio Sanchez Roca, la eksĉefsekretario de la ministro pri la Juĝo dum la registaro de Largo Kabaljero, Sanchez Roca estis arestita tial ke vizitis en la malliberejo la konatan antifaŝistan aktivulon k juriston Barriobero.

* * *

En Romo oni publikigis la 8. liston de la nomoj de la pereintoj en Hispanio. La nomaro konsistas el 998 nomoj. Oni publikigis 380 nomojn, nemenciante kie k en kiu militzono estas pereintaj. Laŭ la jurnalistoj, temas pri la mortigitoj dum la atako kontraŭ Santander.

* * *

Ian de Oktombro 9 faŝistaj aviadiloj flugis super Barcelono k bombardis la laboristan kvartalon Barceloneta. La aviadistoj faligis plurajn bombojn, kiuj kaŭzis multan domaĝon. 37 domoj estis ruinigitaj. 2 bomboj trafis la lernejon k ĉiuj infanoj, kiuj troviĝis en ĝi pereis sub la ruinoj. Nia redaktoro, kiu nu 5 minutojn post la bombardo alvenis al la bombardita kvartalo, povis vidi la teruran bildon. Singultoj, ploroj, ĝemoj, agonio. Vunditaj k kripligitaj laboristoj. Pistitaj sub la detraĵoj virinoj k infanoj. Junulinoj, eksciintaj pri la pereo de siaj gepatroj, laŭte ploras korŝire. Duonfreneziĝintaj patrinoj svene kuradas inter la detruaojn, serĉante siajn idojn. Nur korppartetoj tamen estas troveblaj ĉi-tie k tie. Punca sango makulas ĉie...

Donite la alarmo, tuj alkuris savkomandoj k ambulancoj. La savlaboro tamen estis iom malakcelita pro la rebombardo, kiun provis fari la faŝistaj aviadistoj.

La nombro de la pereintoj en tiu bombardo ascendas ĝis 50.

* * *

"Nia Organo" revuo aperanta en Roterdamo k redaktata de k-do B. C. Rasenberg - Becora, aperigas en la Septembra n-ro artikolon pri la agado de C. N. T. k F. A. I. La artikolo estas titolita "La nuda vehro pri Hispanio". La kompilinto estas Becora.

* * *

Pro la ekskluzivaj militcirkonstancoj la poŝtaĵoj, adresitaj al nia redakcio, prokraste trafas nin. Ekz. letero el Nederlando venas por 2-3 semajnoj, dum en normalaj cirkonstancoj nur sufiĉas 2-3 tagoj. Letero el Toulouse, sendita en la komenco de Junio, alvenis 30an Septembro. Kuriozaĵo, sed fakto.

Krome libroj, senditaj de ni forperdiĝas k ne trafas la alsenditojn.

Pro tio ni petas senkulpigon.

* * *

Pro la plimultiĝo de la abonantoj k pro la nesufiĉa eldonkvanto ni ne povis sendi al ĉiuj la 6 n-ron de In. Bul.

La eldonkvanto de la 7 n-ro — 3000.

---

K-do Johano Fernández dez. korespondadi kun k-doj diverslandaj. Adreso: Johano Fernandez, str. Travesia, San Antonio, 35, I, I, Barcelono.

**NIAJ ABONANTOJ POVAS PAGI SIAN LAUVOLAN ABONKOTIZON AL LA JENAJ NIAJ PERANTOJ:**

| K-dino A. BOIS | K-do Adr. PERSSON | K-do T. C. KLIJN |
|---|---|---|
| á MECÉ par VITRÉ (ILLE-et-VILAINE) FRANCIO | STADSHAGEN 13 - A STOKHOLMO, SVEDIO | DAPPERSTR 123 - huis AMSTERDAMO, NEDERLANDO |
| Francoj, ne forgesu vialandan kotizejon! | Svedoj, kotizu al privialanda peranto | Nederlandanoj pagu lauvolan abonprezon al nia amsterdama peranto |

La kotizontoj el la ceteraj landoj povas sendi sian kotizon k monhelpon al nia k-dino A. BOIS k k-do Adr. PERSSON kiuj estas niaj internaciaj geperantoj.

Anstataŭ sendi al ni responkuponojn, kotizu do rekte al niaj geperantoj.

La hispanaj abonpagontoj estas petataj sendi la monon rekte al ni per posta giro. Adreso por tio: «INFORMA BULTENO», Esperanto-fako, av. Durruti 32-34, Barcelono.

# LETERUJO

J. Welser.—Marlaix. La petatajn librojn ni sendis siatempe. Eble la alveno iom malfruos.

Emilio Manzana.—Fronto de Aragon. Ni sendas al vi lernolibron. Ni esperas, ke vi, komprenintc la nediskuteblan avantaĝon de Esperanto, antaŭ Ido, fariĝos fervora esperantisto.

E. Norman Malmo. El la propaganda materialo, kiun ni disponas, ni sendas al vi por la ekspozicio. La pridirata artikolo evidente estas cinike tendenca. Vi mem povas konstati la veran konduton de la hispanaj anarkistoj k tiun de la menciita institucio. Al ni ŝajnas, ke la artikolo devus esti titolita inverse. Tiele ĝi esprimus la veron.

Karl Klasson.—Hjalmedal. La frazo: La emancipigo de la laboristoj devas esti ilia mema afero. Dankon pri la res. kup!

L. Augusto. — Brest. Ni abonas vin al "Solidaridad Obrera". Se vi hazarde ne ricevos ĝin, avizu tuj al ni. Ni notis atente viajn informaĵojn k enterprenos la entreprenoblan. Dankon pro la res. kun!

J. Bout.—Roterdamo. Ni pliigas la kvanton. Pro via energia k aktiva propagando favore al "In. B." ni gratulas k kore dankas vin. Vi disvendadas 70 ekzemplarojn. La saman kvanton povus disvendadi ankaŭ la kamaradoj el Amsterdamo, Parizo, Stokholmo, Sofio, Buenos Aires ktp. Via ekzemplo estas imitinda k imitenda. Akceptu refoje nian saluton!

Grupo "Naturo".—Cervia. Ni salutas vin pro via entusiasma laboro. Ni sendos el la petataj libroj.

Tage Lau.—Kopenhago. Ni ricevis vian interesan leteron k atentege notis ĉion. Pri k-do A. Wimmer ni scias nenon. Ni klopodos ekscii, pri lia kieo k farto. La petatajn librojn ni sendos sinsekve. Ĉio laŭ anticipa kalkulo, kostas ĉ. 20 fr.fr., kiujn vi devas alsendi al nia paranto.

A. Bois.—par Vitre'. Ni regule ricevadas viajn, leterojn, kvankam kun ioma prokrasto. Ni notas la novajn adresojn. Dankon pro via akurata laboro!

Santiago Nagore.—Barcelono. Venu al la redakcio se vi ne estas superŝutata per laboro.

Sat.—ano 6255. Dankon pro la res. kun!

Helge Fransson.—Kungsor. Ĉiu laŭ sia monhavo. La bulteno sendota regule, ne malkvietiĝu. Dankon pro la res. kup!

Burnell.—Herstal. Ni atendas ekzempleron de la priparolata gazeto. Dankon. Akceptu nian liberecanan saluton!

Pro alsenditaj res. kup. ni dankas al la jenaj k-doj; Viho Kylanpaa, Nestor Lehtanen, Bruno Lehtanen, E. Heinaharju, F. Ojala, A. H. Tahtinen, ĉiuj el Turku.

## Deponejo "INFORMA BULTENO"

| | | |
|---|---|---|
| J. LOZANO | BARCELONO | 6 p-toj |
| JUAN SABATE | BUENOS AIRES | 2 p-toj |
| MANUEL GIL | FARLETE | 50 p-toj |
| A. PASCUAL | frontano | 6 p-toj |
| J. JIMENO | frontano | 6 p-toj |
| J. OBRADOVS | BARCELONO | 3 p-toj |
| NILS HENRIKSSON | KUNGULIK | 5 kr. |
| A. DAMSTEG | ROTERDAMO | 10 p-toj |
| G. WOLMER | TUNGESTA | 5'2 ŝrl |
| ROSARIO LLAIRO | VILLARODONA | 11 p-toj |
| ANTONIO ALSINA | AVIÑO | 6 p-toj |
| JOSE CID | frontano | 6 p-toj |
| CRESENCIO GIL | frontano | 10 p-toj |
| P. OLIVERAS | BARCELONO | 2'5 p-toj |
| F. FERST | REUS | 2'5 p-toj |
| IND. RIUS | BARCELONO | 6 p-toj |
| E. MACIA | frontano | 5 p-toj |
| PUIDOKAS ALFONSAS | JOROBARKAS | 12 fr.fr. |

Al ĉiuj ni esprimas sinceran antifaŝistecan dankon!

ESPERANTO PRES-SERVO DE I' L. E. S.
(Iberia Ligo de Esperantistoj Senstatanaj)

Imp. Cultural E. C. - Salmerón, 241 - Telf. 81076 - Barcelona